# Najlo en la pajlaro – pariga rolludo

| | |
|---|---|
| **Celo:** | Ekzercado de interkonatiĝo |
| **Celgrupo:** | komencintoj |
| **Antaŭpreparo:** | kartoj (modelon vidu sube) |
| **Tempo:** | 5 minutoj |
| **Ludantoj:** | minimume 6 |

La sube prezentitaj kartoj estas disdonitaj al la ludantoj. Oni povas ankaŭ tiri ilin „blinde".
La „A" –anoj atendas en la flughaveno, la „B"-anoj alvenas. Ambaŭ klopodas trovi sian paron, alparolante unu la alian.

| A-kartoj | B-kartoj |
|---|---|
| Vi estas Katona Andrea, budapeŝta studentino. Via atendas vian onklinon, s-inon Linda Greenfield, kiu loĝas en Usono, kaj vi ankoraŭ neniam vidis ŝin. Ŝi alvenos tra Germanio per aviadilo. | Vi estas Linda Greenfield, kiu loĝas en Usono, kaj nun vi vizitas Hungarion. Vi alvenos al Budapeŝto per aviadilo, tra Munkeno. Certe iu parenco atendos vin en la flughaveno. Vi havas genepojn en Budapeŝto, la familia nomo estas Katona, sed ilin vi ankoraŭ neniam vidis. |
| Vi estas Dr-ino Ilona Kis [kiŝ], el la budapeŝta universitato ELTE. Vi atendas profesoron D-ron Gerhard Blanke, kiu estas profesoro de la Esperantologia fakultato en la Universitato de Nurnbergo. Li alvenos je la 17h50 per aviadilo al Budapeŝto | Vi estas Prof-ro, D-ro Gerhard Blanke, profesoro de Esperantologia fakultato en la Universitato de Nurnbergo, Germanio. Vi alvenas aviadile al Budapeŝto, kie atendas vin iu reprezentanto de la budapeŝta universitato, ELTE. |
| Vi estas Varga Edina, budapeŝta studentino. Vi renkontiĝos kun Jassi Huttonen, finna studento el Tampere, kiu vizitos vian universitaton, alvenos al la flughaveno ĉirkaŭ la 6-a horo vespere. | Vi estas Jassi Huttonen, finna studento el Tampere. Vi alvenas per aviadilo al Budapeŝto (por viziti la tiean universitaton). En la flughaveno renkontos vin budapeŝta studento aŭ studentino. |
| Vi estas Zempleni Orsolya [orŝoja], hungara ĉampion-dancistino el Sabatejo. Vi atendas en la flughaveno s-inon Maria Banderas, hispanan flamenko-dancistinon el Madrido. Ŝi alvenos je la 6-a vespere. | Vi estas Maria Banderas, flamenko-dancistino el Madrido. Vi alvenas al la flughaveno de Budapeŝto, kie vin atendas hungara dancistino |
| Vi estas Franka Katalin, jumeo-masaĝistino. Vi renkontiĝos en la flughaveno kun Sibille, franca jogo-trejnistino, kiu alvenos el Parizo, ĉirkaŭ la 6-a horo. | Vi estas Sibille, franca jogo-trejnistino, kiu loĝas en Parizo kaj veturas al Budapeŝto por instrui jogon al kolegoj kaj konatiĝi kun la jumeo-terapio. Vi alvenas al la budapeŝta flughaveno, kie iu certe atendos vin. |
| Vi estas Tóth Zsuzsa [ to:t ĵuĵa], foto-intervjuistino de revuo: La Esperantista Mondo. Vi atendas s-inon Tiziana Beltramini, ĵurnalistinon, ĉefredaktoron el Milano. | Vi estas Tiziana Beltramini, ĵurnalistino kaj ĉefredaktoro, kiu loĝas en Milano. Vi alvenas per aviadilo al Budapeŝto por renkonti hungarajn gekolegojn. Tie atendas vin s-ino Zsuzsa Tóth [ĵuĵa to:t], foto-intervjuistino de la revuo: La Esperantista Mondo. |
| Vi estas Péterfi Matias, komputisto–programisto. Hodiaŭ posttagmeze alvenos el Londono Stefan Sadler, kiu gastos ĉe via entrepreno. | Vi estas Stefan Sadler, loĝanta en Londono kaj komputisto-inĝeniero. Budapeŝta entrepreno invitis vin por trejnado. Vi alvenas al la flughaveno, kie iu atendos vin. |